**3a Paska Dimanĉo – 18 de Aprilo 2021**

## Kristo devis morti kaj leviĝi el la mortintoj la trian tagon.

**Komento de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Luko 24, 35-48**

**En tiu tempo la disĉiploj el Emaus rakontis tion, kio okazis al ili sur la vojo, kaj kiel ili rekonis Jesuon dum la dispecigo de la pano.**

**La disĉiploj estis interparolantaj pri tio, kiam Jesuo mem aperis meze de ili, kaj diris: „Paco estu al vi!“ Kun konsterno kaj timo ili unue pensis, ke ili vidas fantomon. Sed Jesuo diris al ili: „Kial vi havas tiom da duboj en via koro? Rigardu miajn manojn kaj miajn piedojn! Vere estas Mi! Tuŝu Min kaj certiĝu: fantomo ne havas karnon kaj ostojn, kiel Mi.“ Kaj tion dirante Jesuo montris al ili siajn manojn kaj piedojn. Ili tamen ne povis ankoraŭ kredi pro miro kaj ĝojo. Tiam Jesuo demandis ilin: „Ĉu vi havas ion por manĝi?“ Ili donis al Li iom da rostita fiŝo. Jesuo prenis kaj manĝis ĝin antaŭ ili.**

**Poste Li diris al ili: „Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis al vi, kiam Mi ankoraŭ estis ĉe vi. Mi ripetis, ke devas plenumiĝi ĉio, kio estas skribita pri Mi en la leĝo de Moseo, en la libro de la profetoj kaj en la psalmoj.“ Jesuo helpis ilin kompreni la signifon de la Skriboj, kaj Li diris al ili: „Estas skribite, ke la Mesio devos morti, sed la trian tagon Li devos leviĝi el la mortintoj. Laŭ lia ordono nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj invito al konvertiĝo por ricevi pardonon de pekoj. Vi estos atestantoj pri tio, komencante de Jerusalemo.“**

Se neniu evangeliisto priskribas al ni la resurekton de Jesuo, ĉiuj donas al ni altvalorajn indikojn por kiel Lin eksperimenti viva, viviganta nian vivon. La sperto pri la resurekto de Kristo ne estis privilegio por malmultaj, sed eblo por

ĉiuj. Luko, kaj ĉi tie ni estas je la fino de lia evangelio, je ĉapitro 24, insistas pri la verbo "rekoni dum la dispecigo de la pano". Tio, kion Luko estas priskribanta al ni, ne estas vizio, sed sperto, rekono. Estas la disĉiploj de Emaus kiuj revenas, trovas la aliajn kaj rakontas kiel ili Lin rekonis dum la dispecigo de la pano. Kial dum la dispecigo de la pano? Estas Jesuo kiu, dum la lasta vespermanĝo, en la evangelio de Luko, post la dispecigo de la pano kaj ties ofero al la siaj, diris: "Faru tion je mia memoro". En la celebrado de la eŭkaristio, ĉar pri tio temas, en tiu evoluo de amo ricevita kaj amo komunikita, la Sinjoro Jesuo igas sin ĉeesta, manifestiĝas.

"La disĉiploj estis interparolantaj pri tio" – skribas la evangeliisto – "kiam Jesuo mem aperis meze de ili". Estas karakterizo de la resurektinta Jesuo, kiam Li manifestiĝas, Sin meti centre; Li ne metas Sin antaŭe aŭ supre, sed centre, tiel ke ĉiuj havu saman raporton, saman rilaton kun Li; ne ekzistas gravec-hierarkioj, kiu venas antaŭe kaj kiu venas poste. Kaj la unua vorto, kiun Jesuo eldiras al tiuj disĉiploj, estas "Paco estu al vi!" Ankaŭ ĉi tie, kiel en la evangelio de Johano, ne temas pri bondeziro, Jesuo ne diras "La paco estu kun vi", sed pri donaco. Ni scias ke la paco en la hebrea kulturo indikas ĉion, kio kontribuas al vivpleneco, al feliĉo, al bonfarto, al laboro kaj al sano. Nu la resurektinta Jesuo donacas tiun pacon, sed ne temas nur pri donaco, tio estas la pruvo de Lia amo por ili; pro tio Li poste diras ke Li vidigos la manojn kaj la piedojn, kiuj havas la signojn de la krucumo, la amon kiu Lin puŝis fordoni Sian vivon por la siaj kaj li daŭrigas.

Sed la disĉiploj konsterniĝas, ili kredas vidi, kaj ne estas fantomo, la evangeliisto parolas pri "spirito" ĉar ili ne povas kredi iu persono povas pluvivi trapasinte la morton kaj ankaŭ ĉar tuj estas cirkulanta onidiro ke tiu, kiu estis krucumita, reale ne temis pri Jesuo, Jesuo saviĝis. Jen kial la evangeliisto insistas, kaj je tiu punkto estas tri imperativoj unu post la alia, "rigardu, tuŝu" kaj "rigardu", rigardi la manojn kaj la piedojn, kiuj konservas la signojn de la najloj, la signojn de la Pasiono de Jesuo. Estas Jesuo mem kiu trapasis la morton. Kion volas diri la evangeliisto per la sceno de Jesuo kiu manĝas, eĉ kiu petas manĝon? Ke ne temas pri spirito, sed pri persono kun dia kondiĉo. Kaj tio ne nuligas la fizikecon, sed ĝin plilvastigas, ĝin transformas, ĝin transfiguras. Sankta Paŭlo, prenante tiun teologion, ĝin evoluigas kaj en la Unua letero al Korintanoj li parolos pri "animala korpo", kiu estas sepultita kaj pri "spirita korpo" kiu resurektas; temas ĉiam pri korpo, ne pri animo, pri spirito, sed pri korpo alidimensia.

Kaj poste Jesuo, samkiel li faris kun la disĉiploj en Emaus, por kiuj Li interpretis la Sanktajn Skribojn, ĉi tie Li malfermas iliajn mensojn por la kompreno; kial? Samkiel por la disĉiploj de Emaus la Sanktaj Sriboj ne nur devas esti legataj, sed interpretataj; necesas do malfermi la menson kaj ĝin

agordi por rekte interpreti tion kio estas entenata en la Sanktaj Skriboj per la sama Spirito kiu ilin inspiris. Kaj kiu estas la Spirito kiu inspiris la Sanktajn Skribojn? La senkondiĉa amo de la Kreinto por Siaj kreitaĵoj, tiu estas la interpreta kriterio de la tutaj Sanktaj Skriboj.

Jesuo do komprenigas al ili, kaj kion li komprenigas? Tiuj disĉiploj en la Sanktaj Skriboj selektis nur tiujn aspektojn, kiuj priparolis la triumfantan Mesion, la gloran Mesion, la venkantan Mesion kaj iele neglektis tiujn, kiuj priparolis la malŝatatan Mesion, la persekutitan Mesion.

Kaj poste jen la fina mandato de Jesuo, kiu petas ke "Laŭ lia ordono nun devas esti predikata al ĉiuj popoloj", ankaŭ al paganaj popoloj do, "invito al konvertiĝo". La konvertiĝo ne estas konvertiĝo al Sinjoro, sed ŝanĝo de pensmaniero, kiu cetere koincidas kun ŝanĝo de konduto, ŝanĝo de vivo "por ricevi pardonon de pekoj" kaj ne temas do pri kulpoj, sed temas pri nejusta pasinto. Kaj estas aldono flanke de Jesuo tre signifoplena "komencante de Jerusalemo." Estas Jerusalemo, la sidejo de la religia institucio kiu, pro oportuneco, pro intereso, mortigis Jesuon, tiu plej bezonhava de konvertiĝo kaj de pardono de la pekoj.